# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto - Federacio « Languedoc - Roussillon »

5, Quai Vauban - PERPIGNAN (P.-O.) - Téléfono 34-38-84

N° 29 ----------Jara Abono : 2F. ---------------2a Trimonato 1968 -

C.C.P. 956 28 MONTPELLIER.


°°O°°

GRAVA EVENTO !!

En Nimes, la 5an de majo okazos la inaùguro de strato Zamenhof Venu multaj.

Informoj malsupre.

++++++
++

NIMES

Tri anoj ĉeestis kunvenon organizitan de la Nima grupo de "Poreùropa Movado" kiu estis invitinta ĉiujn, kiujn interesas la lingva problemo.

Tiu grupo, aranĝos de la fino de septembro du lingvajn kursojn per aùdvida metodo (germane kaj angle). La prezidanto kiu konas du el la tri esperantistoj, afable donis la parolon al S-ino VOLPELIERE kaj ŝiaj rapidaj sed precizaj klarigoj ne renkontis la barojn, kiujn oni renkontas kutime en ne informita medio, kaj kiujn oni rajtis timi. S-ro CACHON (inspektoro de la unua grada instruado) povis ankaù paroli kaj aldonis siajn spertojn pri esperanta studo.

La prezidanto respondis ke li tute konsentas ke esperanto superas la lingvojn anglan kaj germanan koncerne eĉ nur la Malgrandan Eùropon, kaj konsentis ke esperanta kurso per aùdvida metodo estu ankaù malfermita.

Nun mankas nur la materialo.

Ni memorigas la ekziston de la turisma prospekto pri Nimes en Esperanto, havebla per sendi al alilandanoj, ĉe Syndicat d'Initiative Bd de Prague ( apud Esplanade ) Nimes.

Sur aparta folio vi trovos informojn pri la inaùguro de strato Zamenhof.

**Informo de la redaktoro**

Por konatiĝi la inaŭguro en NIMES nia bulteno devis aperi pli frua ol mi planis. Nun kiam la stenciloj estas jam tajpita mi ricevas de nia prezidanto artikolojn el kiujn unu ĉefe gravas. Feliĉe restas loko por anonci tiu grava renkonto.

Por la unua fojo mi kuraĝas tajpi mi mem stencilon. La legantoj bonvolu pardoni pro eraroj kaj malbonaĵoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

NARBONNE la 19a de Aprilo 1968

Estimataj Geesperantistoj.

La Narbona grupo organizas esperantistan renkonton kiu okazos la 12-an de majo. Ĉiuj esperantistoj de la regiono estas kora invitataj. Tiu renkonto estos ĉefe plia okazo praktiki nian lingvon, vivi en "Esperantio", tiaj okazoj estas ĝenerale tro maloftaj; bedaŭrinde la cirkonstancoj ne permesas al ĉiuj partopreni la jarajn kongresojn.

La renkonto okazos en la Junuldomo (Maison des Jeunes) kiu atendos vin ek de la 9-a.

En la programo

- Prelego pri Kamboĝo kun diapozitivoj (S-ro Deligne)
- Filmo kun komentoj pri Langdok (F-ino Terral)
- Kantoj en Esperanto (S-ro Cabrier brila tenoro)
- Kurta promenado en la Centro de Narbonne.
- Komuna manĝo en restoracio "l'Escargot": 12 F(Kun vino kaj servo.

La programo ne estas ampleksa por eviti laciĝon kaj por permesi liberajn diskutojn kaj konversaciojn.

La kunveno komencos je la 10 ½, kaj ĉio esenca finiĝos je la 18-a.

Partoprenontoj bonvolu anonci vin, preferinde tuj, almenaŭ antaŭ la 5-a de majo (por la restoracio)

Skribu al E.Sayag, "La Frileuse, rue de l'Ancien courrier 11 NARBONNE.

Amikan saluton.

Narbona grupo

**VIVO DE LA GRUPO EN PERPIGNAN :**

En Perpignan la esperanta vivo estas, tiun jaron, vintrodormanta sed, tamen, trikursoj funkcias regule ĉiun semajnon kaj la 26-an de februaro, ni akceptis Ge-rojn KAUFFMANN el Svislando kiuj vizitis nian urbon revenante el vojaĝo tra Hispanujo.

BEZIERS.

La Grupo organizis la 17an de marto 1968 en Kongrespalaco de Beziero kulturan kunvenon dum kiu estis prezentataj :

" Langvedoko ", porturiste propaganda filmo, realigita de F-ino F. TERRAL, kaj destinata al prezentado eksterlanda.

" Miaj Feriaj Taskoj en Ĉekoslovakio ", filmo de F-ino F. TERRAL farita dum somera restado ĉe esperantista amiko.

" 50.000 Kilometroj en Sovetio " , diapozitivoj prezentitaj de F-inoj A. SALCE kaj A. REY pri longa vojaĝo tra Rusio kaj Siberio : Moskvo, Irkutsko, Samarkando, Taŝkent, Kievo, k.t.p... Renkonto okazis kun Esperantisto en Irkutsko, kaj la tuta esperantista Grupo en Taŝkent ĝoje kaj varme akceptis la francajn esperantistinojn.

Antaŭ la prezentado, Grupanoj el Beziers kaj Narbonn estis kuniĝintaj por amika kaj gaja tagmanĝo en restoracieto beziera.

°°o°°

MONTPELLIER.

Dum aprilo, ni havis la plezuron akcepti du eksterlandanojn.

La 5an , ni retrovis nian amikinon de la lasta jaro : Nelly TENSEN de Amsterdam.

La 19an, denove ni kunvenis honore de ĉeka gasto : Sinjoro RYZNAR.

La sepa numero de nia loka bulteno aperis.

°°o°°

NACIA KONGRESO

En la fama urbo Aix en Provence, okazis la 60a Nacia Kongreso de U.F.E. Oni jubiliis samtempe la 70an datrevenon de la kreo de la asocio

Partoprenis pli ol 200 samideanoj inter kiuj 20 el nia Federacio.

Ĉeestis 2 Germanoj, 3 Nederlandanoj, 1 Ĉeko, 2 Novzelandanoj.

Akcepto okazis en la urbdomo. La vicprefekto ĉeestis la inaŭguron nome de la regiona Prefekto de Provence.

La laboraj konsidoj estis bone sekvitaj kaj laŭdire de la germanoj la lingva nivelo estis alta. Dimanĉon vespere, bonega kaj altkvalita spektaklo kaptis nin.

La kongresanoj ĉeestis la inaŭguron de " Rue des Esperantistes " kaj iris al la statuo de Frederic Mistral kie oni deponis bukedon kaj kantis esperante la " Coupo Santo ".

Du eskursoj estis organizitaj por viziti provencajn kastelojn, Kamargon kaj Arles.

# NIA FEDERACIA KONGRESO

========

La koketa mezepoka civito Aigues-Mortes akceptis la 7an de aprilo nian jaran kongreson. Ĝi okazis en la tute renovigita junuldomo.

Partoprenis 50 gesamideanoj el Perpignan, Montpellier, Nimes, Ales, La Grand-Combe, Le Cailar. Kun plezuro, ni notis la ĉeeston de F-ino TENSEN el Amsterdamo, S-ro FRUS el Torino kaj de gesamideanoj el Aix en Provence, Arles, Marvejols, Toulouse. Ni denove tute dankas al ili.

Ĉe la malfermo, S-ro Maurice FONTAINE, salutis la gekongresanojn nome de la urbkonsilantaro.

S-ro LLECH-WALTER, prezidis. Post la raportoj de S-roj ANGEVIN kasisto, LLECH-WALTER, prezidanto de la federacio, S-roj VIGNE kaj SANTAMARIA ( Alès), LENTAIGNE ( Montpellier ), S-ino VOLPELLIERE (Nimes) raportis pri la agado de siaj respektivaj grupoj. F-ino VIERNE (Montpellier ), akcentis la neceson plinombrigi la U.F.E. membraron por doni al nia movado pli da influo ĉe la oficialaj intencoj kaj proponis modifi la statutojn por krei novan kategorion da membroj : " Membres sympathisants.

S-ino VOLPELIERE informas ke en Nimes estas Eŭropa Movado kie oni instruos lingvojn pere de aŭdvida metodo kaj ke estas celeco ankaŭ instrui esperanton. Ŝi demandas ĉu aŭdvida metodo ekzistas por esperanto.

S-ro LLECH WALTER, F-ino VIDAL, S-ro ANGEVIN estis reelektataj kiel prezidanto, sekretariino, kaj kasisto de la federacio por la periodo majo 1968 - majo 1969.

Je la 12a la urbestraro regalis nin per honora aperitivo en la " geedziĝa ĉambrego " de la urbdomo.

Posttagmeze la gesamideanoj vizitis la " Tour de Constance " kaj promenadis sur la remparoj.

Ili disiĝis je la kvina kontentaj pri tiu agrabla renkontiĝo.

Ni notu ke dum du tagoj larĝa flagrubando etendita ĉe la ĉefenirejo de la urbo montris al la turistoj kaj preterveturantoj al la marbordo ke Esperanto vivas.

# STATO DE KOTIZOJ KAJ ABONOJ LAU GRUPOJ

La 19-an de aprilo 1968

| | Abonoj al Sud-Franca Stelo | U.F.E. | | U.E.A. | |
|---|---|---|---|---|---|
| | | Simpla | Abonanta | M.J. | M.A. |
| | 2F. | 5F | 20F | 17,50 | 35F |
| MONTPELLIER | 26 | 8 | 11 (b) | 2 | 9 (a) |
| PERPIGNAN | 11 | 2 | 11 | | 3 |
| NARBONNE | 7 | | | | |
| BEZIERS | 23 | | 3 | | 3 (a) |
| NIMES | 13 | 13 | 1 (b) | | |
| ALES | 17 | 18 | 2 | | 1 |
| IZOLULOJ | 8 (c) | | 1 | 1 | |

41 29 70

(a) Kelkaj dumvivaj membroj.

(b) Kelkaj pagitaj pere de G.E.E.

(c) Nur 6 Federacianoj, la aliaj estas eksterfederacianoj.

Rilate la abonoj al Sud-Franca Stelo, ni rimarkas ke dum
1966 proksimume 97 samideanoj pagis sian abonon
1967 nur 67 " " " "
Kiom por 1968 ? ĝis nun : 105.

## FRANCA KARAVANO AL LA UNIVERSALA KONGRESO EN MADRID

=======

La Franca Unuiĝo por Esperanto ( U.F.E. ) organizos aùtobusan karavanon al la Universala Kongreso en Madrido.

La karavano foriros de Parizo la 30an de julio, trairos Bordeaux kaj la landlimon ĉe Hendaye la 31an de julio.

La karavano restas en Madrido dum la tuta kongreso, tio estas de la 3aĝis la 10ade aùgusto. Post tra Sarragosse, Lerida, Barcelone Perpignan, Beziers, realvenos en Parizon, là 15an aù 16an de aùgusto. La sudanoj povas aliĝi la karavanon sur vojo ( Bordeaux, Hendaye,) kaj forlasi ĝin ankaù sur vojo ( Perpignan Beziers..) laù plaĉe .

La prezo estas 1360,00 fe. ĝi inkluzivas la voyaĝon aùtobuse, la loĝadon en konfortaj hoteloj, la manĝoj sur vojo kaj en Madrido la loĝadon en hotelo kaj unu manĝon tage. Tiel la aliĝontoj povos elekti la restoracion por la dua manĝo tage.

Por ĉiuj informojn sin turni al Union Française pour l'Esperanto 34 Rue de Chabrol PARIS ( 10ème ) :

0

ooooo

## ITALAJ KARAVANOJ AL MADRIDO

=======

Italaj karavanoj sur vojo al Madrido trairos nian regionon.

La karavano organizita de Sinjoro GRATTAPAGLIA de Torino,tranoktos en Nimes la 31 an vespere.

La karavano de gejunuloj tranoktos en Montpellier la unuan de aùgusto vespere.

Respondeculo de la akcepto de tiuj karavanoj :

Sinjoro FRUS 2 M N° 996


Z.U.P. 30 NIMES.

0

ooooo

Ronéotypé par la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon

DIRECTEUR de la publication :Lucien ANGEVIN. 30 LE CAILAR.




NIMES
=========

La 5an de MAJO 1968

Inaùguro de la Strato ZAMENHOF - en la ĉeesto de la aùtoritatuloj.

TAGORDO :

- Rendevuo je la 10a 1/4 precize - ĉe la angulo de la strato ZAMENHOF kaj de la strato "FELIX EBOUE".

  ATENTU : La nova kvartalo "Chemin Bas d'Avignon" estas malproksima de la urba centro. Aùtobusoj : Linio B - Foriro Fronte la stacidomon je la 9a, la 9a20, la 9a40

- Ebla komuna manĝo - prezo : laùvole : 10 Fr aù 12 Fr (trinkaĵo ne entenata.)

  Por helpi nin, bonvolu enskribiĝi sufiĉe frue ĉe G^oj VOLPELIERE 10, rue de la Servie - NIMES

- Posttagmeze : vizito de la urbo kaj de ĝiaj romiaj monumentoj.